

Numero: 303.
Aŭgusto 2017.

25-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Laborante en fremda lando

Mi ne deziras fari politikan rimarkon pri la hungaraj gejunuloj, kiuj forlasis Hungarion kaj nun ili laboras eksterlande.

Ilin delogis multe da mono kaj la espero de la pli bona vivo.

Kompreneble tiu ĉi fenomeno estas en ĉiu orient-eŭropaj landoj, kiuj estis la iamaj socialistaj landoj.

Mi ne vidas danĝere la situacion. Se ni rerigardas al la pasintaj jarcentoj, ni povas vidi, gejunuloj volonte iris eksterlanden en ĉiu jarcento por lerni, labori aŭ nur serĉi aventuron. Multaj el ili ellernis iun fremdan lingvon.

Tio estas bona. Antaŭ ili malfermiĝas la mondo. Ili ellernas la vivmanieron, kutimojn de la foraj homoj kaj poste espereble ili ekkonas pli bone la eksterlandanojn parolantajn diversajn lingvojn.

Tio ne plaĉas al mi, ke ili uzas la lokajn lingvojn dum la restado en iu fremda lando. Alveninte hejmen ili apenaŭ scias la gepatran lingvon. Ili balbutante babiladas kun siaj parencoj kaj familianoj, kvazaŭ ili nun lernintus la hungaran lingvon.

Kompreneble laŭ mi dum monatoj aŭ kelkaj jaroj oni ne povas forgesi la gepatran lingvon. Tiu ĉi afektado devenas por montri al la hejmerestantoj, mi jam estas pli eminenta, pli saĝa, ol vi.

Estus tre bone, se mi erarus. Sed mi timas, tiuj gejunuloj serioze pensas tion ĉi.

Mi deziras insulti neniun. Mi intencas prilumi tiun ĉi fenomenon.


Kiel mi jam skribis, scii fremdajn lingvojn estas bona kaj sekvinda afero. Malgraŭ tio, laŭ mi la mondo estus pli demokratia, se la eksterlandan komunikadon plenumus sendependa, neŭtrala lingvo, kiel ekzemple Esperanto.

Ankoraŭ oni ne esploris, ĉu la junaj laborantoj eksterlande, kiel rilatus al la lingvo de doktoro Zamenhof.

Nun ili laboras en Anglio, Germanio, Francio, Danio ktp. En tiuj landoj ili devas ellerni la lokajn lingvojn, se ili deziras perfektan karieron.

Ĉu ne estus pli bone, se EU (Eŭropo Unuiĝanta) elektus Esperanton, kiel komunan helplingvon por la komunikado inter diverslingvaj homoj?

— Redaktanto —



Tradukmaŝino

— Fileto mia, - diris la patro al sia filo – post kelkaj tagoj vi festos vian naskiĝdatrevenon. Vi fariĝos dekdu jara knabo, preskaŭ plenaĝulo. Okaze de via naskiĝdatreveno mi deziras aĉeti por vi tradukmaŝinon. Ĝi povas traduki naŭdek naŭ lingvojn. En la estonto vi ne havos lingvajn malfacilaĵojn. Ĉie vi povos komprenigi vin kaj vi povos traduki fremdajn tekstojn. Mi esperas, mia donaco ĝojiĝos vin.

— Paĉjo kara, mi ne volas tradukmaŝinon – diris la knabo. – Mi deziras lerni lingvon. Min interesas la lingvolernado. Mi petas vin, ne aĉetu por mi ĝin.

— Sed fileto mia, mi jam priparolis ĝin kun via panjo. Ankaŭ ŝi konsentas kaj ŝi subtenas min en mia decido. Diru al mi sincere! Kiu junulo havas tradukmaŝinon en la lernejo? Ili nur revadas pri ĝi. Ĉu ne? Hieraŭ mi elektis ĝin en la vendejo. Laŭ la komizo la aparato estas unuklasa kaj kiel mi jam menciis, ĝi tradukas naŭdek naŭ lingvojn. Ĝi povas traduki eĉ la lingvon mandarenan. Onidire en Ĉinio ĝin parolas plej multope.

— Dankon! Mi ne petas tradukmaŝinon. Vane vi elĵetas monon tra la fenestro. Anstataŭ tio surprizu min per alia donaco!

— Fileto mia, vi stultiĝis. Nuntempe ĉiu homo volas lerni diversajn lingvojn. Vi ne devos lerni, ĉar tiu ĉi maŝino helpas al vi.

— Mi volas lerni nur unu lingvon, kiu estas por mi tre necesa.


— Ĉu vi volas lerni nur unu lingvon? – ekmiris la patro kaj li kolereme rigardis al sia fileto. – Per unu lingvo en la mondo vi ne povos komprenigi vin tra la tuta mondo. Vi devus ellerni almenaŭ kvin aŭ ses lingvojn por ke vi ne havu lingvajn malfacilaĵojn. Ĉu vi scias tiu ĉi lingvolernado kiom da tempo kaj energio bezonas. Fileto mia, pripensu la aferon! Mi petegas. Viaj patro kaj patrino volas por vi bonon. Iam ankoraŭ vi estos dankema, kial ni aĉetis por vi tradukmaŝinon.

— Ankaŭ mi petegas, ne donacu ĝin al mi. Mi neniam uzos la tradukmaŝinon. Mi ne bezonas tiun ĉi aparaton.

— Per unu lingvo vi povos komprenigi vin tra la tuta mondo. Malkaŝu al mi, kiu estas tiu lingvo?

— Esperanto.

— Ŝaŝa —



Malnova somero

La belaj someroj rapide forpasas. Pli rapide, ol oni pensus. Apenaŭ ili komenciĝas kaj jam alvenis aŭtuno la malvarma, nebula vetero. Restas por ni nur la belaj, neforgeseblaj memoroj.

La viro sidis en la aŭtuna parko kaj rigardis la flavajn, sekajn arbofoliojn en la koto. Nokte pluvigis kaj ĉio estis humida, eĉ ankaŭ la benko sur kiu li sidis.

Malvarmeta vento kuris tra la parko kaj ĝi karesis lian vangon. En la okuloj de la viro larmogutoj brilis. Ili estis apenaŭ rimarkeblaj.



Ankaŭ li ne sciis kiel, en sia cerbo ekaperis someraj bildoj pri la forpasintaj belegaj monatoj.

Apenaŭ pasis tiuj ĉi neforgeseblaj tagoj. Ĝiaj bruoj kaj gustoj ankoraŭ tie ĉi vivas en lia koro.

Li klare vidas ŝian blondan, longan hararon kaj ankoraŭ aŭdas ŝian karan voĉon. Ŝia spirito ankoraŭ estas kun li, nur la korpo forlasis lin. Terure!

Dolorigis lin la memoroj. Li fermis la okulojn kaj lasis, ke la venteto taŭzu lian hararon.

Antaŭ kelkaj semajnoj ankoraŭ ŝia mano faris tion ĉi kaj amajn vortojn flustradis en lian orelojn.

Ho, kiom belega momento ĝi estis. Li neniam forgesos tiujn minutojn.

En iu tago ĉio finiĝas, sed li ne pensis, ke tiom rapide kaj subite.

Ploro sufokis lian gorĝon kaj ekstremis. Malvarma spiro trakuris lian tutan korpon. Antaŭ liaj okuloj denove ekaperis ŝia ĉarma kaj karega vizaĝo. Li ne povis liberiĝi de la malgaja penso, ke ŝi foriris por ĉiam. Ŝi jam neniam revenos. Vane li deziras, tiu ĉi bela somero forpasis. Kaprica vento forblovis ankaŭ ŝin.

Kion fari? Por li restis nur la doloriga memoro. Ĉiutage pensi pri ŝi estas turmenta sufero, kvazaŭ el lia karno oni eltranĉus peceton.

Matene vekigante ankaŭ hodiaŭ li deziris forgesi la knabinon. Sed li ne povas. Se li suprenrigardas al la blua ĉielo, ĉiufoje li vidas ŝin. En ĉiu trilado de la birdoj li aŭdas ŝian mildan voĉon. La vortoj, kiuj forlasis ŝiajn lipojn iam lian nomon vokis.

Al kiu ŝi flatadas, kiel katido? Kiun ŝi invitas al siaj varmaj brakoj?

Eble estas pli bone, se li ne scias tion. Forgesi ĉion, tio ĉi estas lia unusola deziro. Li sentas neniam povos forgesi ŝin. Dum sia vivo li ĉiam estos ŝia sklavo kaj en ĉio li serĉos ŝin. Se li iras sur la strato kaj antaŭ li virino promenas similante al ŝi, lia koro emociiĝas kaj apenaŭ povas elteni la doloron.

Ne nur en la naturo estas aŭtuno. Ankaŭ en lia koro la esperoj kaj kredoj malrapide transformiĝis, kiel el verda arbofolio fariĝas seka, flava memoro de la someraj momentoj.

Forpasis la somero. Li restis sola kaj forlasita. Ili jam neniam renkontiĝos.



En iu somera vespero li atendis ŝin antaŭ la sukeraĵejo kaj ili kune manĝis gigantan glaciaĵon. Ili apenaŭ povis finleki ĝin. La lastan gluton li donacis al orfa hundeto, kiu vagadis dum la tuta vespero sur la stratoj de la urbeto.

Ili ridis kaj brakumante promenis en la varma nokto.

Nenio interesis ilin. Ili estis surdaj kaj blindaj. Ili ambaŭ vidis per sia koro.

Nun estas malvarmeta, humida aŭtuno. Forflugis la somero kaj tiu ĉi sezono jam neniam revenos por li.

Post aŭtuno venos frosta vintro. Jam neniam revenos somero. Ŝi forlasis lin pro alia viro.

Kial? Kial? – li demandas malgaje, sed neniam li ricevos respondon.

Vesperiĝis.. La vetero fariĝis pli malvarma. Li ekĝemis kaj stariĝis.

Kien iri nun? Li ĉirkaŭrigardis. Neniun li vidis en la parko. Ĉio estis muta kaj sileta, kiel lia koro, kiu somere ĝojegis pro amo.

— Apáti Kovács Béla —




Poezio

Kiu legas verson en la someraj monatoj? Certe malmulte da homoj malfermas poemplibron, kiam la sunradioj arde brilas. Prefere oni iras por baniĝi al marbordo aŭ al iu plaĝo.

Kiu kunportas poemplibron por ferio? — Estus bone kredi, ke ankoraŭ ekzistas poezioamantoj, kiuj ĉiutage legas poemojn.

Nuntempe la homaro malofte legas versojn. La mondo ŝanĝiĝis kaj anstataŭ poemoj oni rigardas televidon aŭ oni pasigas la libertempon aliel.

Estus laŭdinde denove turni nin al poezio, ĉar ĝi donas eksterordinaran senton al la leganto.



William Blake

La Malsana Rozo

tradukis A. D. Foote

Ho Roz', vi
malsanas!
La sekreta
pesto
Fluganta
dumnokte,
en kriĉa
tempesto,
Vian liton
karminan
De ĝojo
elserĉis;
Kaj per amo
malluma
Vian vivon
elsuĉas.



Nur Unu Lingvo

de Ludwig Wittgenstein



Kelkfoje mi provas min meti
en la malnovaj ŝuoj de avino,
kiu parolas nur enlandan lingvon
kaj simplan parolmanieron,
por bone kompreni ŝin
kaj ŝian propran mondon,
kiu ŝajnas mistero al mi.

Oni timas ke estus malfacila tie,
en tiu vera monolingva mondo,
ĉar ni uzus tro malmultajn vortojn
por akurate priskribi oceanon de ideoj.
Eble ni vivas en la amaso de lingvoj
tiel ni ne povas ekvidi la feliĉon
de vivi monolingve sub la ĉielo.

Nun mi estas en mondo de Babel
kun lingvaj brikoj ĉirkaŭ mi.
Iuj estas fortaj, iuj estas malfortaj.
Bonŝancaj brikoj por reĝa palaco
havas gloron, prestiĝon kaj benon.
Sed nura peco en la mano de avino
bezonas amon de nova generacio.

Kvankam ni havas fortajn brikojn
por libere konstrui novajn turojn
kaj konstruaĵojn en la tuta tero,
simpla enlanda lingvo de avino,
malgraŭ ĝiaj evidentaj limoj,
bezonas zorgon por postvivi
en la mondo de lingva kuro,
kiu fariĝas pli kaj pli forta.

Jogjakarto, Indonezio, 16/III/2007



Por infanoj



Elefanto kaj la muso



Antaŭ multaj jaroj estis granda elefanto. Ĝi vivis en la urba zoo-ĝardeno kaj la infanoj admiris ĝin ĉiutage.

La elefanto estis tre fiera besto. Ĝi ĝuis la multajn vizitantojn en la zoo-ĝardeno. Fine ĝi jam kredis, se ĝi ne estus, tiam neniu vizitus aliajn bestojn.

— Mi estas la plej granda. Mi estas la plej bela — diradus vespere al siaj najbaroj. Dekstre loĝis malgranda leporo kaj maldekstre la ruza vulpo. Ili ambaŭ timis de la elefanto, tial ili ne volis kontraŭdiri.

Verdire la elefanto estis la plej granda inter la bestoj. Ĉu ĝi estintus la plej bela, tio jam estas argumentebla. Sed neniu kuraĝis diri al la elefanto. Ankoraŭ la fortega leono silentis kaj ne deziris diskuti kun ĝi.

En iu vespero museto envenis la loĝlokon de la elefanto. La granda besto, kiam ekvidis ĝin, tre ekmiris.

— Kio vi estas? — ĝi demandis.

— Mi estas museto. Ĉu vi ne aŭdis pri mi? Strange. Ja, mi estas la plej forta besto en la tuta mondo..

La elefanto ekridis.

— Ĉu vi estas la plej forta? Vi ridigis min. Se mi volas, tiam mi mortpaŝas vin per mia giganta piedo.

— Elefanto, vi estas tro memfidema. Ni vetu, ke mi superas vin!

— Vi superas min. Ĉu? Tion mi ne kredas.

— Do, aŭskultu min — diris la malgranda muso — se mi superos vin, mi estos la reĝo de la bestoj.

La elefanto akceptis la proponon de la museto.

— Kiel ni decidis, kiu estas la plej forta? — demandis scivole la elefanto.

— Simple ni povos decidi pri ĝi — diris la malgranda muso. — Morgaŭ matene, kiam alvenos la vizitantoj, ni ambaŭ iros al la homoj, De kiu ili ektimos kaj forkuras, tiu estos la plej forta besto.

La ideo plaĉis al la elefanto. Ĝi ne dubis, ke ĝi superos la muson. Dum la tuta nokto ĝi prepariĝis al la konkurso.

La malgranda museto reiris al sia truo kaj agrable dormis ĝis mateno.

Frumatene la elefanto jam staris ĉe la kaĝo kaj atendis la vizitantojn. Ĝi grimacis kaj per la piedoj ĝi frapegis la teron montrante ĝi estas treege timiga besto.

Je la naŭa horo malfermiĝis la zoo-ĝardeno. Ĉi tage estis dimanĉo, kaj multaj homoj volis vidi la bestojn.

Kompreneble ankaŭ nun homamaso rapidis al la elefanto, kiu trumpetis timige per sia rostron. Ĝi tiom frapegadis la teron, ke ĝi preskaŭ detruigis. La homoj hurlis pro la feliĉo, ĉar ili ankoraŭ ne vidis tiel la grandan beston. Neniu ektimis de ĝi.

Pasis longaj minutoj. La homoj ne forkuris de la kaĝo.

La museto rigardis la elefanton el sia truo. Kiam ĝi jam enuis la interesan konduton de la elefanto, ankaŭ ĝi ekaperis.

La museto trakuris la loĝlokon de la elefanto. Ĝi rekte kuregis al la direkto de la vizitantoj.

Unue knabineto ekkriegis:

— Muso! Ve, ĝi ĝuste kuras al ni!

La homoj komencis kriegadi ĉe la kaĝo, eĉ la virinoj, kiel frenezuloj forkuregis.

Je la laŭta kriegado venis la bestozorganto.

— Kio okazis Bambi? Ĉu ĉi tiu museto timigis vin? — li diris ridante.

Vespere la elefanto honteme agnoskis, ke la malgranda muso superis ĝin kaj eble ne ĝi estas la plej forta besto en la zoo-ĝardeno.

— Onklo Adalberto —

Ni ridu!

Deziro

- Du homoj iras hejmen ebrie.
— Estus bone, se mi estus muso – ripetadas unu ebrulo al la alia.
— Kial vi deziras fariĝi muso? – demandas lia kunulo post iom da tempo.
— Ĉar mia edzino timas nur de muso.

— o —



— o —

Malfacila infanaĝo

- Maljunulo rakontas pri sia infanaĝo al la genepoj:
— Karuloj mi havis tre malfacilan infanaĝon, eĉ ĝi estis tragika. Ni estis sesope kaj mi estis la plej juna. Ĉiam mi devis surporti ilian vestaĵon.
— Kial ĝi estis tragika?
— Car ĉiuj kvin infanoj estis knabinoj.

— o —



Ni ridu!

Du amikoj babiladas en la drinkejo:

- Mi aŭdis ke nian komunan amikon Petron forlasis lia edzino, ĉar li drinkis tro multe.
— Kelnero, mi petas ankoraŭ unu botelon da konjako!

— o —



— o —

- Matene la knabeto iras al sia patro kaj demandas:
— Paĉjo, ĉu vi scias, kiom da dentopasto estas en la ujo?
— Mi ne scias, fileto mia.
— Tri metroj.

— o —



— o —

- Karulo, vi ŝatas la bestojn. Ĉu ne?
— Kompreneble, kara mia. Ĉefe mi tre ŝatas la rostitan kokinion.

— o —